

Ni aŭskultu Denis de Rougemont, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 762, 1978.05.18 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En sia pripensiga verko L'Avenir est notre affaire (Estonteco estas nia afero) la svisa kaj eŭropa filozofo **Denis de Rougemont** atentigas nin pri du kontraŭaj sintenoj fronte al la vivo kaj al la destino de la homo sur la Tero. Kaj li konstatas, ke tiuj ĉi du sintenoj markas nian konduton antaŭ la problemo politika de la konstruo aŭ ne de nukleaj energi-donaj centraloj. Ni provas resumi liajn dirojn helpe de esperantigitaj citaĵoj.

A.- Dum unu moralo « celas unue la liberecon », la alia « volas antaŭ ĉio la sekurecon. » (p. 86.)

Cl.- **Denis de Rougemont** notas, ke « se oni celas antaŭ ĉio la sekurecon, oni tiam emas akcepti la internan logikon de la ŝtata maŝinego, oni kalkulas pli kaj pli je la Ŝtato, kaj fine oni opinias normale, ke estu la Ŝtato mem – kiel siatempe la antikvaj Reĝoj – kiu monopole disponigu Energion. Energio venanta do el la ekstero, kaj kiun la Registaro disponigas al ni.

A.- Se kontraŭe oni celas unue la liberecon kun la riskoj, kiujn ĝi entenas ..., oni emas postuli propran aŭtonomecon, kiun la Ŝtato minacas, kaj kiun la industriaj produkto-necesej tendencas forigi. Kaj iom post iom oni alvenas al la ideo serĉi la energion kiel eble plej proksime de si, en la najbara ĉirkaŭaĵo, ĉe akvofalo, rivero, ventoforto, sun-lumo aŭ sun-varmo, (kiuj ne eltenas centraligon, tial niaj Ŝtatoj ilin misfamigas.) Kaj oni iros pli foren. Oni baldaŭ komencos serĉi la energion en si mem ... » (p. 86.)

Cl.- Kaj **Denis de Rougemont** konklude skribas : « Serĉi la energion, kiu estas en la homo, anstataŭ oferi la homon pro la energio disdonata de la Ŝtato, laŭ mi tio estas revolucio, ĉar tio signifas ĝisradikan ŝanĝon en la celadoj, ŝanĝon kapabla rezultigi nenombreblajn aliajn ŝanĝojn en nia viv-sinteno, kiel en ĉiuj niaj politikaj kaj sociaj strukturoj. » (p. 86.)

A.- La moraloj de la sekureco kaj de la libereco drome alfrontiĝas koncerne la hodiaŭan lukton por aŭ kontraŭ la nuklea energio. **Denis de Rougemont** tre atente priskribas tiun ĉi lukton. Li opinias, ke la pornuklea politiko profitas je blinda apogo, kiu siatempe favoris la naskiĝon de la koncepto de la di-raĵtaj monarkioj. Ni traduke citas tiurilate pripensigan tekston :

Cl.- « Ekzistus nuklea politiko, kiun karakterizis la ĉeftraĵoj, kiuj faris dum la fluo de la jarcentoj la forton de la di-raĵtaj monarkioj. Tio estas :

A.- **la sekreto,**

Cl.- kiu impresas minace ;

A.- **la ĵuro restis muta,**

Cl.- kiu estas trudata al ĉiuj regatoj ;

A.- **la arbitro de la princo,**

Cl.- nur kelkaj potenculoj aŭ baronoj estis incitaj pri la reĝaj motivadoj longcelaj ;

A.- la pretiĝo de la altaj muroj,

Cl.- kontrolturoj, gvatejoj kun hirtaj elektronaj detektiloj ;

A.- la senmezuregaj kostegoj

Cl.- kompare kun la privataj ebloj ;

A.- la danĝer-etoso,

Cl.- kiu disradias ŝajnon de sankta ĉeesto ; fine la magia ideo ege primitiva, ke

A.- la reĝo posedas la energion,

Cl.- estas la fonto de la reĝa forto kaj fundamento al la reĝeco. »

A.- Denis de Rougemont aldonas :

Cl.- « La plimulto de la politikistoj en niaj landoj nostalgias, neniam agnoskante tion, al la absoluta monaskio ; ili sin fordonas al la regado de tiuj pens-strukturoj obskure sentataj kiel tiuj de la Povo mem : la kaŭzo estas, ke ili volas regi. La plimulto de la impost-pagantoj lasas sin senmonigi senreziste en la ideo asekuri la propran komforton kaj ĉefe la propran sekurecon : la kaŭzo estas, ke ili volas esti regataj. » (p. 87.)

A.- Post tiu analizo oni komprenas, kial la hodiaŭa debato por aŭ kontraŭ nukleaj centraloj tiel akriĝis. La Naci-Ŝtatoj havas intereson rapidigi la konstruon de tiuj ĉi centraloj, antaŭ ol ili fariĝis vere necesaj kaj eĉ antaŭ ol la fizikistoj kapablis solvi la prizorgadon de la radioaktivaj rubaĵoj, ĉar la ekzisto mem de la radioaktiva danĝero aŭtomate kreskigas la potencon de la registaro super la regatoj.

Cl.- La kurego al la konstruo de nukleaj centraloj baziĝis sur la mito, ke la energi-bezonoj en Eŭropo duobligos ĉiujn sepajn aŭ dekajn jarojn. Fakte estas rimarkinde, ke ĝis la jaro 1974 la reklamado de la elektro-produktantoj senĉese instigis la publikon krekigi la energi-konsumadon. Samtempe la serĉado de la aliaj energifontoj, ol la nuklea, estis neglektita, ĉar nedeziritaj. Interalie la Naci-Ŝtatoj ne ŝatas la dolĉajn teknologiojn, kiuj povas kapti la sun- aŭ vent-energion, ĉar ili havas por la civitanoj liberigajn konsekvencojn. Ni citas :

A.- « Tiom longe, kiam la Naci-Ŝtatoj ne kapablos trovi rimedon pro intermeti komputilon inter la suno kaj ni, oni respondos, ke la dolĉaj teknologioj daŭre ne estas maturaj, kaj oni ilin vicigos inter la morgaŭajn energiojn. » (p. 79.)

Cl.- Denis de Rougemont tre detale pravas, ke la asertoj, ke la nuklea energio estas necesa al la naci-defendo, estas mensogaj. Ni citas :

A.- « Nur la multnaciaj entreprenoj kapablas asekuri niajn naciajn sendependecojn, almenaŭ tiom longe, kiam tio plaĉos al ili, kaj ke ili ne perdos tro da mono. Kiam ĉio sinkos en la ŝuldojn, kiam tiu elspeziga potencoformo ĉesos ilin interesi, tiam alvenos por ili la momento esti ŝtatigitaj. ..., la deficitajn transprenos kiel ŝarĝon la impost-pagantoj. » (p. 80-81.) ... «La ĉefa stultaĵo estas paroli pri **nacia sendependeco** koncerne la energi-kampon, ... Ĉiuj

niaj centraloj dependas de aliaj landoj, eĉ de aliaj kontinentoj por la uranio, la teknologio, la financado kaj la revigligo de la eluzaĵoj.[...] » (p. 81.)

Cl.- Vi aŭdis kelkajn dirojn de la svisa verkisto **Denis de Rougemont**, ĉerpitaj el lia libro *L'Avenir est notre affaire*. La venontan semajnon ni daŭrige prezentos al vi tiun ĉi pripensigan libron.

A.- Kaj jen, por konkludi nian elsendon, ni malfermu nian leterujon.

Cl.- Sinjoro ... en Angers, Francio, skribis : « Tre dankemaj ni restas al vi ne nur nome de Grésillon, ankaŭ pro viaj valoraj elsendoj esperantolingvaj, bone aŭdeblaj en nia franc-regiono : Okaze de monataj klubkunvenoj en Angers parto de la kunsidoj estas dediĉata al raportoj de Svisa Radio-aŭdantoj. Kelkfoje al redono pere de sonbendoj. Al sinjoro ... kaj al la membroj de la esperanto-klubo en Angers ni peronde sendas niajn amikajn salutojn. Koncerne la programon de la esperantista kulturdomo en Grésillon, ni memorigas, ke la somera sezono malfermiĝos komence de julio kaj daŭros ĝis la monato septembro.

A.- Prelegis el Svislando gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012